# KOMITATO
# 7-a de junio 2025

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj** 5 min

Sabaton la 7-an de junio 2025, de la 16a ĝis la 18a kunvenis dum la kongreso de Nanto kaj rete pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.
[ĉeestas: S = surloke en la kongresejo, R = rete pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Andréa | BERTRAND | AB | Repr. de la membraro | | X | | |
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | S | | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Clément | GENTY | CG | Repr. de la membraro | | | X | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | S | | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | | | X | |
| Jean-Lucien | MAZEAU | JLM | Repr. de la membraro | | | X | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | S | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | S | | | |
| Christine | RAIFFAUD | CR | Repr. de la membraro | | X | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | S | | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | S | | | |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de fed. Limousin | S | | | |
| | | | Repr. de fed. Hauts-de-France | | | | |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | S | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | S | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | S | | | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | X | |
| Inès | KAHIN | IK | Repr. de JEFO | | | X | |

13 komitatanoj ĉeestas el 20.
2 senkulpiĝis, el kiuj 0 donis povon.
Estas kvorumo (½) voĉoj

XG prezidas, MP protokolas
Venonta kunveno en la posta tago

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Stato de la aliĝoj por 2024/2025** DISKUTO 10 min
Estas 582 membroj la 6a de junio. Sen kalkuli la dumvivajn membrojn estas nun pli ol duono de la membroj kiuj venas pere de lokaj asocioj. Ni devas pensi pri kiel evoluigi la funkciadon de la asocio ĉi rilate.

**1.2 Preparado de la Ĝenerala Asembleo** DISKUTO 30 min
Financa raporto : prezento kaj respondoj al demandoj. La proceso estas malfacila tasko por Régis kiu neniam faris bilancon ĝis nun (la ekskasisto Paul faris tion malfacilan taskon por prepari bilancon). SM

multe helpis sed ni ne ankoraŭ certas ke la bilanco estos preta por la membrokunveno.
Propono de voĉdonado de la financa raporto dum la membrokuveno anstataŭ la perkoresponda baloto preparo de budĝetoj : budget en cours 2024-2025 et budget prévisionnel 2025/2026. Malgraŭ la manko de certo pri la bilanco, Regis kaj Xavier preparis la nunan budĝeton kaj la venontjaran budĝeton. Tio eblas ĉar ni havas la saldon de la bankkonto.
Do minimume, ni voĉdonos pri la nuna kaj venonta budĝetoj.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Kio nova pri informado? — DISKUTO 10 min

*retejo, sociaj retoj, redakto de komunikoj kaj dissendo…*
*Kiaj bezonoj por la lokaj asocioj?*
Bilanco de la antaŭa kunveno kun respondeculoj de lokaj kluboj (vidu la protokolon)
Flugfolioj : ni bezonas profesian laboron. Do ĉu ni uzos la oportunecon por renovigi la logon de la asocio ? Ni konsentos budĝeti 3000 eŭrojn.

### 2.2 Trejnado — DISKUTO 5 min

*Kiuj trejnadoj ŝatus la aktivuloj de lokaj asocioj?*
Retaj socioj : bezono de trejnado : Françoise Noireau, Lucile Brobeck, I&E eblas. Provizo da 1000 eŭroj kaze ke oni uzu profesian solvon kiel tiu de E@I
bibliotekoj : sperto de Bruno R.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

### 3.1 Le Monde de l'Espéranto — INFORMO 2 min

Kiu rezulto pri la kontakto kun Celine Bernard ? BF/XG
daŭre en diskuto, ni esperas konkretan proponon por la sekva kunveno post la membrokunveno.
La propono de Céline estis labori ĉ 2 monatojn por salajro de 3 smic. Ni konsideras ke ne necesas 2 monatoj ĉar ni ne bezonas enpaĝigon, do inter unu kaj unu monato kaj duono sufiĉas. Ni konsentas meti 4000 eŭrojn (kosto de 2 smic) en la venonta budĝeto por provizi monon por pagi ĉefredaktoron.
Ni konsentas inviti Céline-n Bernard-n al la komitatkunsido de la dimanĉo 8an de junio.
Porinforme jen la priskribo de la taskoj:
[https://docs.google.com/document/d/1YCXWHu_qsRPBK3z92FYq9pkxgWg3sGduABImybZ4bts/edit?usp=sharing](https://docs.google.com/document/d/1YCXWHu_qsRPBK3z92FYq9pkxgWg3sGduABImybZ4bts/edit?usp=sharing)

### 3. Esperanto Aktiv — INFORMO 5 min

La eldono estas nun ĉiu dua monato sur la reto de Esperanto France aŭ per sendo per retaj adresoj. Ĉu ni ne devos sendi papere al la membroj kiuj ne havas retadreson. XG proponas provizi monon por la venonta jaro , 500 eurojn estas konsentitaj.

### 3.3Kongreso 2025 — INFORMO 2 min

142 aliĝis.

### 3.4 Kongreso 2026 — DISKUTO 5 min

Sekve de la nea respondo de Toulouse, ni devas trovi alian urbon/asocion
Eble pripensi pri alia organizado? (ekzemplo de Italaj kongresoj). Marsejlo, Hérouville Saint Clair, Belfort, Norda federacio estas pripensitaj. Esperanto Provence havas komitatkunsidon post du semajnoj. TS devas pridiskuti tion kun la KK. RC sendos al TS kaj Hérouville Saint Clair, la kontrakton kiu ekzistas inter la nacia kaj loka komitatoj. La prefero de Marsejlo estus organizi la 2027an kongreson.

### 3.5. Eldonoj kaj butiko — DISKUTO 5 min

Evoluo de la vendoj laŭ nombro de novaj eldonitaj libroj kaj reklamado kaj eventoj por vendi (kongresoj).
Multe pli da vendoj dum 2023/2024 : 22 000 eŭroj (16 000 eŭroj dum 2022/2023) 2024/2025 aperas kiel meza jaro.
Studinda por pli da efiko. La propono por la eldonoj de Metodo 11, Metodo 12 kaj eble la tradukoj de la noveloj de la konkurso 2024.

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

4.1 **Metodo 12** **INFORMO** **2** min

En preparo por la fino de la jaro.